



Saluton al Ĉiuj

Ni estas Ermanno Tarracchini, Laura Barbieri kaj Fulvia Sighinolfi de la kolektivo Bernardoni. Ni volas doni al vi nur kelkajn stimulojn kaj pensojn de la kuracisto A. Bernardoni, pri nova aliro al la kontentigo de la bezono de homa kresko dum la tuta vivo. Stimuloj, ekzemple, por pripensi la efikojn de pov-rilatoj interhomaj rilatoj, por fidi ke pli bona ĉiutaga viv-kvalito jam eblas hodiaŭ, ankau dank'al revizio de la edukado ricevita ekde la infanaĝo, sen psikologiaj analizoj kaj misinterpretoj, ĉar «La sekreto de homaj faktoj povas esti malkaŝita nur per la scienco de la historio per konkreta kolektiva analizo de la biografio de la individuo komprenata kiel biologia objekto kaj historia subjekto. Multe gravas referenci al la scienco de la edukado, t.e. la pedagogio, al la popola solidareco kaj al la spertoj de vivo de ĉiuj homoj. Pro tio ni prezentas kelkajn argumentojn prenitajn el la libro de Antonietta Bernardoni

«La ĉiutaga vivo kiel historio sen timoj kaj sen psikiatrio». Temas pri fragmenta kolekto de kelkaj notoj de la autorino skribitaj en diversaj tempoj kaj situacioj.

Nia kolektivo «Antionietta Bernardoni»

Nia kolektivo «Antionietta Bernardoni» konsistas en grupo de homoj, kiu atente sekvis la esplorojn kaj agadojn de la kuracistino «Antionietta Bernardoni» dum kelkaj jardekoj

Post la morto de A.Bernardoni, ni kreis la kolektivon “Bernardoni” poste kolektis kaj kunigis kelkajn ŝiajn eseojn en tiu ĉi libro.

Kial ni klopodas diskonigi la penson kaj la agadon de Antionietta Bernardoni?

ĉar ŝi donis gravajn respondojn alla sekva demando: ĉu al la problemo de la homa kresko kaj de justaj interhomaj rilatoj devas okupiĝi nur la teknikistoj aŭ ni ĉiuj?



Antonietta Bernardoni (1919-2008)

Bernardoni estas konata – ne nur en Italio - ĉar ŝi metis la resanigajn prozetojn de la tiel nomataj mensmalsanuloj en la centron de sia esplorado kaj pro sia radikala kritiko al psikiatrio, psikanalizo, psikologio. Tiel ŝi startigis la publikajn debatojn pri Populara Terapio Agado kaj la konstruadon de antrop-evolua malalienado, nova scienco, laŭ kiu en la kampo de justaj homaj rilatoj ĉiuj povas iĝi esploristoj kaj sciencistoj.

ŝi naskiĝis la 2-an de novembro 1919 en Montese (Modeno), kie ŝi mortis post longa malsano en 2008.

ŝi unue akiris diplomon pri beleto kaj filozofio ĉe Universitato de Florenco kaj poste diplomiĝis pri medicino kaj kirurgio ĉe Universitato de Modeno.



ŝi estis instruistino, kuracistino, terapiaistino, esploristino. Forte kritika pri la nuna soci-ekonomia sistemo, ŝi konstante rilatis al la laborista movado.

En ŝia terapio, la kreo de helpgrupo estis centra. Ŝi ne multe pripensis la simptomojn de la subjektoj en terapio, sed prefere analizis la disvolvan potencialon de iliaj interhomaj rilatoj. Ŝi laboris komence private – per individua terapio - kaj poste publike, per la Popola Terapio Agado au PTA (itale, Attività Terapeutica Popolare au ATP) de ŝi mem kreita. Popola Terapio Agado ne estas resaniga medicina agado, sed nova formo de preventa popola agado de senpaga, kolektiva, konkreta, daŭra, kaj reciproka naturo.

Ŝi verkis

La solva metodo fero a un metalmeccanico (Mensa sana: letero al metalisto), Tipografia Dal Cin, Carrigiano, 1973.

La psichiatra contro la scuola
(Psichiatra kontraŭ la lernejo),
Edizione M.C.E., Conegliano, 1975.

La psichiatra senza futuro
(Psichiatra sen estonteco),
Edizione L'Asia, Padova, 1975.

La psichiatra strategica popolare
(Popola terapia agado),
Cooperativa Tipografi, Modena, 1976.

Multisenzitaj ciklostilajaj
verkoj kaj disdonitaj ĉe konferencoj.

www.antoniettabernardoni.it

ŝi verkis «La psikiatrio kontraŭ la lernejo», «La mensa sano - letero al la metalmekanika laboristo». «La popola terapia agado» «Psikiatrio sen estonteco» Ĉiuj dokumentoj troviĝas ĉe la fonduso Bernardoni, nuntempe, bedaŭrinde, nur en la itala lingvo, estas senpage libere elŝuteblaj en PDF el la retejo www.antoniettabernardoni.it

Skribas Antonietta Bernardoni pri tiu ĉi temo en sia libreto
“La psikiatrio kontraŭ la lernejo”:

E

Antonietta Bernardoni

La psikiatrio kontraŭ la lernejo

La malvaloriga aktiveco
de la kuracisto-psiko-
pedagogiaj teamoj.

Modena settembre 1975

“La ekzisto de lerneja psikologo, deprenante de la instruisto la respondecon, kreas sentojn de nekapableco en la plej lertaj instruistoj kiuj vere volas helpi la "malfacilan" infanon, sed ili pensas ke, ĉar ili estas senigitaj de la 'fundamentaj' psikologiaj scioj, ili ne estas kapablaj fari tion.



Sed ili estas pli kapablaj auskulti kaj kompreni iliajn bezonojn ol la psikologoj ĉar la edukistoj pasas multe pli da tempo kune kun la gelernantoj kaj konas plej bone iliajn bezonojn...krome la instruistoj kaj la edukistoj povus profundigi la lernadon de la procesoj de la mensa aktiveco pere de la neuro-pedagogio.

Aliflanke la ĉeesto de la psikologo en la lernejo kreas alibion por instruistoj malpli engaĝitaj kiuj diras "estos la tasko de la psikologo," se ne solvi la problemon de la infanoj, almenaŭ atribui al la nekapablo de la infanoj mem siajn lernejan fiaskojn kaj siajn malfacilecon de socialigo.

Por ĉi tiu nekapablo ekzistas alibio, kiun ni tute ne akceptas: estas alibio reprezentita per la aserto ke ĉi tiuj estas problemoj ke nur psikologio, psikanalizo, psikiatrio estas kapablaj solvi.

Fakte hodiaŭ pedagogio, en Italio, preskaŭ ne plu ekzistas... anstataŭita de la psikologio kiuj per ĝia suspekt-kulturo de perturboj etikedigas la homojn (psikologio, ekzemple, parolas per etiked-akronimoj ADHD (t.e. atento deficino kaj hiperaktiveco)..DSA (t.e. Specifaj Perturboj de lernado kiel disleksio, disgrafio... Ktp.)

**Pri tiu-ĉi medikalig-kulturo je suspekto de perturboj donas al ni -
taugan ekzemplon per rakonteto - la fama itala pedagogo G. Rodari**



La nigra suno

Mia knabineto desegnis karbonigran sunon
Nur ĉirkaŭita de kelkaj oranĝaj radioj.

Mi montris la desegnon al kuracisto.

Li balancis la kapon, kaj diris:

"La kompatind-ulino, mi suspektas, estas
turmentata pro malĝoja penso, kiu igas ŝin
vidi ĉion nigra. En la plej bona kazo ĝi estas
vidmanko: portu ŝin al okulkuracisto".

Tion diris la kuracisto kaj mi estis mortanta
pro timo.

Sed, tiam rigardante plej bone la suban
parton de la desegno, mi vidis, ke tie estis
skribita, en malgrandaj literoj: **"la eklipso"**.

(Gianni Rodari)

Nuntempe, tamen, la amasa invado de la eduka kaj socia sfero fare de la psikologio, reduktante la pedagogiajn sciencojn al "servistinoj de la psikologio" kiam ne tute forigitaj, preparas la kulturan terenon - socian kaj lernejan - **al la kulturo de suspekto de la perturboj**, kiu, pro la unua malfacileco je vivi, kreski, lerni aŭ kompreni, trovas respondon en la klinika-diagnoza praktiko de "psikologiaj" intervenoj kaj en la hontindaj kaj kontraŭsciencaj inteligentec-mezuraj testoj (IQ),

Ni malkoloniigu nian ĉiutagan vivon

de antaŭjuĝoj, timoj, kondiĉadoj
per zorgema serĉado de la realaĵo
kaŝita malantaŭ malgrandaj gestoj, kiuj kutime
estas konsiderataj sensencaj.



A. Bernardoni skribas:

«Perforto de kutimo» (p. 43)

*“La sklavo, kiu preterpasas antaŭ niaj okuloj,
trenante sian pezon, ne frapas nin: li kvazaŭ
venas al ni kiel nevidebla. Se ni vivas en sklava
epoko, ĉio ĉi estas parto de la pejzaĝo»*



La **malkonoligo de la ĉiutaga vivo** ne havas kiel finan celon la malkovron de la psikanaliza nekonscio, kiu anstataŭe estas centra en la libro «psikopatologio de la ĉiutaga vivo» de Freud. Sed, ekzemple, temas anstataŭe, malkovri la ligojn inter la malgrandaj gestoj de la ĉiutaga vivo, kun la procezoj de ideologia subigo, aŭ de iberigaj procezoj [...].

“La diverseco de povo inter la diversaj membroj de la familio kaj la diferencoj de traktado kiuj devenas de ĝi, konsistigas terenon sur kiu pli facile aperas sentoj de angoro kaj timo” (p.83)

Ĉiutaga subpremo Ĉiutaga liberigo Povaj rilatoj en la familio.

L

Ekzemple

Pag 63 **1- La privata proprieto de la infanoj**¹³

Gepatroj, kies gefiloj havas eĉ pli gravajn problemojn ol tio - kio kutime okazas en nia socio - ĉiam pli emas vidi la eksteran mondon kiel la malamikon de la "normaleco" de sia infano. Ili preteraŭdas ĉiun lian telefonvokon, spionas ĉiun kontakton kaj ĉiun rilaton. Ili traserĉas la skribaĵojn serĉante leteron, sekretan taglibron aŭ ajnan alian spuron, kiu fine metas ilin sur la spuron de la "malamiko". Temas pri tiu, kiu ŝtelas de ili la korinklinon kaj estimon de la filo, de kiu ili senescepte ĝuus en la foresto de "konfliktiganto".

Fakte nur agnoskante la ekziston de malamiko eblas – laŭ ili – doni klarigon pri la rifuzo – alie nekomprenebla – akcepti kun entuziasmo resti por ĉiam la privata, ekskluziva, persona posedaĵo de la gepatroj.



Alja ekzemplo
(Pag 53-54)

2- **Lerneja sukceso ne indikas la kontentigan kreskon...**

Ni opinias, ke gravas, ke edukistoj kaj lernantoj alfrontu sen antaŭjuĝoj la problemojn rilatajn ne nur al malsukceso sed, paradokse, ankaŭ rilatajn al nekutima lerneja sukceso...

...junulo, kiu dediĉas sin "korpe kaj anime" al studado en lernejo kiel la nia, kaj atingas la plej altajn sukcesojn, estas kutime malfeliĉa junulo ankaŭ ĉar, estante la lernejo kia ĝi estas, estas malfacile ebligi, ke lia studo estu vere la rezulto de la deziro koni.

Ĉiutaga subpremo Ĉiutaga liberigo Povaj rilatoj en la familio.

L

Ekzemple

Pag 63 **1- La privata proprieto de la infanoj**¹³

Gepatroj, kies gefiloj havas eĉ pli gravajn problemojn ol tio - kio kutime okazas en nia socio - ĉiam pli emas vidi la eksteran mondon kiel la malamikon de la "normaleco" de sia infano. Ili preteraŭdas ĉiun lian telefonvokon, spionas ĉiun kontakton kaj ĉiun rilaton. Ili traserĉas la skribaĵojn serĉante leteron, sekretan taglibron aŭ ajnan alian spuron, kiu fine metas ilin sur la spuron de la "malamiko". Temas pri tiu, kiu ŝtelas de ili la korinklinon kaj estimon de la filo, de kiu ili senescepte ĝuus en la foresto de "konfliktiganto".

Fakte nur agnoskante la ekziston de malamiko eblas – laŭ ili – doni klarigon pri la rifuzo – alie nekomprenebla – akcepti kun entuziasmo resti por ĉiam la privata, ekskluziva, persona posedaĵo de la gepatroj.



Anstataŭe, ĝi estas kutime la rezulto de la deziro havi ajnan formon de sukceso, kiu povu kompensi multajn gravajn aspektojn de la vivo, en kiu li renkontis gravajn fiaskojn. Temas precipe pri la kunteksto de emociaj rilatoj ĉu familiaj aŭ eksterfamiliaj. La deziro koni la mondon ne igus lin modela lernanto, sed ĝi komprenigus al li, ke gravaj sciofontoj estas fremdaj al la lernejo.

Eĉ en la familio kutime ni demandas al la infanoj: "kian laboron vi volas fari, kiam vi kreskos"? Kontraŭe bezonus demandi ankaŭ "kia" homo vi volas deveni, tio estas, "kiu vi volas esti", ne nur kio!

Ankaŭ al la demando "Kian noton vi ricevis en la lernejo? Bezonus demandi: "ĉu vi havas bonajn rilatojn kun viaj samklasanoj"?

Alja instrumento de povo super homoj! La neraciaj timoj: E

“Eduki al la timo aŭ eduki al la eksploro kaj kontaktigo kun la homa mondo?”

[...]Timo esence originas el aparteco, izolado, soleco, malfido inter homoj [...]. Sed por havi pli feliĉan kaj plenan personan, familian kaj socian vivon, ni bezonas scii kiel liberigi nin de ĉia senracia timo, de ĉia angoro ne pravigita de realaj kialoj, de angoroj ne ligitaj al konkretaj danĝeroj [...]p.83

“...ĉiu civitano kapablas kontribui al sia kaj alies mensa sano, rekonante siajn timojn kaj venkante ilin...”

Ni liberigu nin de neraciaj timoj

p 83 Ni tre bone scias, ke la rektaj kaŭzoj de la neraciaj timoj troviĝas [...] en la leĝoj, kiuj reguligas la plej altan nervan agadon, kies bazo, kiel montris Pavlov kaj lia Lernejo, estas la tiel nomata kondiĉita reflekso.

Por la momento ni nur memorigas, ke per kondiĉita reflekso ni celas apartan reagon de la organismo al eventoj de la ekstera mondo.

La kondiĉita reflekso establas provizoran ligan inter la malsamaj partoj de la centra nervosistemo kaj mediaj stimuloj. Tiun ligan do dependas samtempe de mediaj kondiĉoj eksteraj al la organismo kaj de kondiĉoj internaj al la organismo mem.

Estus ege utile, ke ĉiuj povu koni la leĝojn de la plej alta nerva agado, kaj ankaŭ la kondiĉojn de ekesto kaj malapero de kondiĉitaj refleksoj.



Ekzemploj de timoj:

La **timo paroli publike**: “Parolu vi, kiu studis! Mi ne kapablas, se mi parolus, kiu scias kiom da eraroj mi farus!”.

Ĉar ekde la elementa lernejo la uzado de dialekto aŭ gramatika eraro estis asociita – per kondiĉita reflekso – kun la riproĉo de la instruisto.

La timo de la mallumo.

Ekzemplo de malkondiĉa lerneja eksperimento, pri la superado de la mallumotimo kaj de la monstroj: la kuracistino Bernardoni sugestis al mi ke utilas meti poŝlampeton sub la kuseno, kiun la infano povas ŝalti per malforta premo kaj kiu malŝaltiĝas tuj kiam la infano endormiĝas kaj ne plu premas la poŝlampeton

La timo de insektojn

Ni imagu, ekzemple, ke infano havas senracian timon koncerne apartajn insektojn kaj ke tio malhelpas lin ludi ekstere kun siaj kunuloj.

Se la infano ricevas agrablajn stimulojn (kiel la guston de ĉokolado) samtempe kun la ĉeesto de la objekto de angoro, se ni zorge trankviligas la infanon ankaŭ per la sufiĉa distanco, ni vidos, ke la timo malpliĝos, ĉar la agrabla efiko de manĝado kaj la trankviliga distanco de la objekto de timo estigos objektivan kontentigon, malgraŭ la relativa ĉeesto de la objekto de timo.

Sed kiel malkoloniigi la ĉiutagan vivon kaj plibonigi la personecon de la individuo?



Tiudirekte Bernardoni konkrete proponis la asembleojn de Popola Terapio Agado, kies celo estas la scienca studo de la homa personeco, la viv-kvalito, kaj la interhelpo inter ĉiuj. A.B. montris al ni, ke eblas transformi interhomajn rilatojn kaj la ĉiutagan vivon de ĉiuj per senpagaj, reciprokaj, konkretaj, kolektivaj, dauraj asembleoj sen spertuloj.

En ŝia terapio, la kreo de helpgrupo estis centra. Ŝi ne multe pripensis la simptomojn de la subjekto en terapio, anstataue ŝi analizis la disvolvan potencialon de lia aŭ ŝia propra reto de interhomaj rilatoj, de lia aŭ ŝia manieroj rilati kaj vivi, de lia aŭ ŝia projektoj, kohereco kun la monda koncepto.

La partoprenantoj al la asembleoj de Popola Terapio agado, estas kiel "homaj speguloj", en kiuj la partoprenantoj reflektiĝas, por ricevi novajn bildojn pri si mem...pri eblaj ŝanĝoj de siaj propraj sintenoj...kaj novajn celojn...pripensojn, emociojn...

La karakteroj de Popola Terapio Agado

L

Senpaga	Ĉar ĝi kontraustaras al la homa helpmerkato forte asertante ke reciproka helpo povas esti donita sed ne vendita
Kolektiva	Ĉar la terapio kapabla apartenas ekskluzive al komunumo de civitanoj en tute, kies komponanto neniu kapalas ekzerci
Konkrete	Pro la atento donita al la materiaj aspektoj de la vivo kaj al eksplicitaj aŭ kaŝvestitaj de povo kaj forto rilatoj
Daura	Ĉar la asembleo ĉiam okazas en la samaj tagoj de la semajno kun regulaj intervaloj
Reciproka	Ĉar la daŭra inversigo de la rolo de kiu estas helpita en la rolon de kiu helpas, evitas la riskon de rilato de kolonigo

Aliaj kolektivaj Ŝancoj por debato

Krom "Popola Terapio Agado" Antonietta Bernardoni proponis ankaŭ aliajn kolektivajn ŝancojn per egalrajta debato por superi la kondiĉadojn kaj la timojn por ekzameni potenco-rilatojn en grupetoj, por revizii la ricevitan edukadon, ekzemple:

- 1- renkontiĝoj en la domaro por superi "aldonajn" konfliktojn,
- 2- stud-eksplorigrupoj (ĉar nur kun la partopreno de eksteraj fortoj povas esti modifitaj rilatoj, kiuj, ene de la familio, ŝajnas neŝanĝeblaj),
- 3- semajnaj renkontiĝoj pri reciproka instruado (ni ĉiuj havas ion por instrui).

Pritrakti personajn kaj ĉiutagajn vivajn problemojn en la publikaj asembleoj promociitaj de A. Bernardoni direktitaj el neniu - kaj kie iuj fakuloj aŭ spertuloj povas partopreni nur por diskuti pri sia persona vivo, nek por instrui nek por kunordigi aŭ faciligi la asembleojn - estas konkreta helpo por havigi al homoj plej povon pri la propra vivo kaj malpli povon pri la vivo de aliuloj.

"Kuracistino Bernardoni, elkore interesigis kaj konkrete zorgis pri **la diferenco inter - kiel la homoj estas kaj kiel ili povus esti, do - la diferenco inter reala persono kaj potenciala persono**" * pri tio skribis la poezion:

Loĝas en vi potenciala vivo

"Loĝas en vi potenciala vivo
ke vi ankoraŭ ignoras.
Ĝi estas en vi, sed vi ne vidas ĝin:
rigardu ĝin, kaj ĝi fariĝos reala vivo"

* El notoj kiujn Mariagrazia Campana skribis dum parolado de A. Bernardoni en la asembleo de Popola Terapio Agado, 1977.



En Antonietta Bernardoni Pedagogio kaj Poetiko estas kunfanditaj. Fakte la konstruado de novaj rilatoj inter homoj por la evoluo de specia konscio bezonas larĝan spiron kaj pli larĝan horizonton, al kiu poezio povas kontribui.

ĉe la libroservo vi povas trovi la libron de Antonietta Bernardoni. Nia celo estas diskonigi konceptojn kaj proponojn de A. Bernardoni do ni esperas ke iu esperantisto tra la mondo pretas, volontule, traduki al sian propran nacian lingvon "La ĉiutaga vivo kiel historio" kiu estas disponebla papere ĉe la libroservo.



Dankon pro via partopreno kaj atento!

kaj ankaŭ elŝutebla ĉe ILEI https://www.ilei.info/agado/chiutaga_vivo.pdf